der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

16. Jahrgang Nr. 104 (6/1980) ISSN 0014-0619 30 Pf

Profesoro Simeon Naumoviĉ Podkaminer - 80 jara

Interparolante kun la jubileulo kaj aŭskultante liajn vervajn elpaŝojn, estas malfacile kredi pri okjardeka aĝo. Sed la dato estas fera: la 11an de februaro, en la jaro 1901, naskiĝis Simeon Naumoviĉ Podkaminer. Li povas retrorigardi vivon, riĉan je ĝojo kaj malĝojo, bataloj kaj venkoj. Je la tago de la vivojubileo lin atingos varmaj kaj elkoraj gratuloj el la tuta mondo, kaj inter tiuj ankaŭ de la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko, organizitaj en Kulturligo. Estas bela okazo iom revui la vivon de tiu elstara homo, komunisto, sciencisto, socia aganto kaj esperantisto. Kun koraj sentoj kaj varma amikeco, kun dankemo kaj amo rilatas tiuj al li, kiuj havis la feliĉon iom pli bone konatiĝi kun li.

La origina deziro de la patro, muzikisto, estis, ke ankaŭ la filo ekhavu similan profesion. La juna Simeon Naumoviĉ sekve vizitis kelkajn jarojn la konservatorion. Tamen pli allogis la teknikaj sciencoj. Kaj li fariĝis fervoja inĝeniero, poste specialiĝis en tute alia fako, nome ekonomio de aertransporto. En tiu fako S. N. Podkaminer kandidatiĝis (laŭ eŭropaj kutimoj: doktoriĝis), fariĝis katedestro en la Aertrafika Altlernejo de Leningrad, vicrektoro kaj fine rektoro. La milito devigis ŝanĝi la planojn. Prof. Podkaminer estis vokita al la Leningrada Fronto kaj tie partoprenis la faman, heroan 900-tagan reziston de la urbo kontraŭ la faŝisma blokado. Estas ankoraŭ hodiaŭ streĉe kaj animskue aŭskulti liajn prelegojn pri tiu temo, ŝajne unika en la milithistorio. En la jaro 1943 li, kolonelo, fariĝis la ĉefo de la 7a fako de la fronto, la fako „Speciala Propagando". Temis pri la laboro kun la germanaj militkaptitoj kaj la propagandado en la vicoj de la faŝismaj trupoj. Kunlaborante kun la Komitato Libera Germanio, formita el iamaj naziaj oficiroj kiuj serĉis novan komencon, li kunlaboris i. a. kun Max Seydewitz, Walter Ulbricht, Wilhelm Pieck, Alfred Kurella, Wilhelm Florin k. a. elstaraj konstruintoj de la postmilita socialisma germana ŝtato. Multaj germanaj oficiroj kaj soldatoj dankas al la soveta kolonelo Podkaminer la komprenon pri nova vivocelo, por nova komenco. Se oni hodiaŭ aŭskultas la veteranon, oni bone povas imagi, ke li en la sieĝita Leningrado multfoje estis vokita por fari prelegojn, batalalvokojn, klarigajn kaj kuraĝigajn. Li donis kuraĝigon en tiu senkuraĝiga tempo. En lia iama leningrada apartemento, konforma al

sciencisto, jam loĝis 18 homoj. El ili nur postvivis la kruelan tempon 3. Por ne frostmorti ili forbrulis la multmillibran bibliotekon, la meblojn, la parkedon, kiel en multaj similaj kazoj ...

Aŭskultante liajn emociajn prelegojn pri tiu tempo de la blokado – kaj prof. Podkaminer tion multfoje faris ankaŭ en GDR (ekzemple por solene malfermi la lernojaron de la partio en Kulturligo de GDR 1977) – oni ricevas impreson de tiu heroeco, kiun li mem partoprenis, al kiu li apartenis. Sed ne kiel malamiko, kiel helpanto por nova vojo, li post la militfino venis al la Soveta Okupita Zono de Germanio kontroli la demokratecon de la plebiscito en Saksio pri senproprigo de la naziaj bienuloj kaj fabrikestroj. Kune kun la profesoroj Tjulpanov, Dümschitz k. a. li helpis almenaŭ en unu parto de la disigita Germanio, konstrui novan ŝtaton. En tiu tempo li ankaŭ havis certan rilaton al la fondo de Kulturligo. Pro tio kaj pro liaj meritoj en la evoluigo de la rilatoj inter sovetaj kaj germanaj esperantistoj en GDR, precipe (sed ne nur) al Dresden, Kulturligo de GDR en 1975 distingis lin per la Johannes-R.-Becher-Medalo en Oro kaj 1979 per la Honorinsigno de Centra Laborrondo. Kiel membro de delegacio de iamaj sovetaj kulturoficiroj li vizitis 1980 nian landon okaze de 35 jaroj de la liberigo.

Li, la iama kolonelo ĉiam plej ardis por la paco. Multajn funkciojn li havis kaj ankoraŭ havas en la pacmovado. Tiel li ekzemple gvidas la komisionon por internaciaj rilatoj de la Leningrada Packomitato.

Esperanton li jam lernis kiel juna studento en la jaro 1920 kaj apartenis al la vigla junula kerno de la Esperanto-societo en la tiama Petrograd. Li kunorganizis 1921 la unuan Sovetunian Esperanto-kongreson, dum kiu fondiĝis Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (SEU). Estas interesege aŭskulti lin pri la tiutempa agado, pri liaj renkontiĝoj kun Ernest Drezen, Nekrassov k. a. Ankaŭ la organizo de la 6a SAT-Kongreso en la jaro 1926 en Leningrado parte ŝuldiĝas al la engeĝemo de S. N. Podkaminer. Li estis la sekretario de la Loka Kongresa Komitato. Parte, ĝis 1937, li havis diversajn funkciojn en SEU: prezidanto de la junulara sekcio de SEU, kandidato kaj poste membro de la Centra Komitato de SEU, sekretario de la leningrada sekcio de SEU k. a..

Post la dua mondmilito li daŭrigis sian socian agadon, kunligante pacmovadajn aktivecojn kun esperantistoj. Tiel li fariĝis la prezidanto de Esperanto-Komisiono de Leningrad, vicprezidanto de MEM kaj, en la jaro 1979, elektiĝis vicprezidanto de la nove fondita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj prezidanto de ties MEM-sekcio. Sennombraj estas liaj prelegoj kaj artikoloj pri MEM, esperantista pacagado kaj aliaj aspektoj de la Esperanto-movado. Ne ĉiu ŝatas lian kritikeman kaj revolucian vervon, lian energiplenan agemon, puŝanta ĉiam al pozitivaj ŝanĝoj, al novigoj, ĝuste kiel decas por komunisto kaj revoluciulo, kiu scias kion signifas batali por noblaj celoj. Lia estimo en la sovetia kaj tutmonda Esperantomovado estas altega. Ĉu ne plej bela esprimo de tiu estimo kaj amo, kiun li renkontas, estas la fakto, ke sovetuniaj junularaj Esperanto-grupoj elektis lin „honora membro“? Kaj, vere, S. N. Podkaminer iel restis juneca, ofte pli juneca ol pli junaj ol li. Mi konatiĝis kun la jubileulo en la jaro 1967, kiam li partoprenis internacian esperantistan konferencon en Rostock, ŝajne la unua tiaspeca post la fondo de Centra Laborrondo (tiun konferencon ankaŭ partoprenis E. A. Bokarev). Poste li denove revenis al GDR en 1977 kaj 1980. Plurfoje mi havis la feliĉon renkonti lin ekster-

Pri la 65a Universala Kongreso de Esperanto

Ĉi-foje en Stokholmo

Jam la trian fojon Svedio estis la gastiganta lando por Universala Kongreso. Jam en la jaro 1934 Stokholmo estis la kongresurbo por 2042 esperantistoj (la 26a UK). 1948 oni renkontiĝis en Malmö al la 33a Kongreso kun 1761 personoj kaj de la 2a ĝis 9a de aŭgusto 1980 la sveda metropolo gastigis entute 1807 kongresanojn el 51 landoj al la 65a Universala Kongreso, el GDR la CLE-delegacion Rudolf Hahlbohm kaj Detlev Blanke.

Tiu kongreso, por okcidentaj cirkonstancoj, estis sufiĉe multnombra, almenaŭ dum la lasta jardeko nur Varna (1978, 4414) kaj Londono (1971, 2071) estis pli multnombraj. Nu — la nombro tamen ne estas tiom grava (kvankam oni ofte en esperantistaj rondoj mezuras kvaliton, senkaŭze, per kvanto). Kiel ĉiu kongreso ankaŭ ĉi-tiu lasta elstaris pro kvalitaj trajtoj, pro specifaĵoj.

Jam la inaŭguro fariĝis vere impresa, aparte pro la fakto, ke la sveda parlamenta prezidanto, Ingemund Bengtsson, la Alta protektanto de la kongreso, ne nur simple partoprenis sed eĉ parolis en klara Esperanto. Dum la dudekaj jaroj li estis lerninta la lingvon kaj rapide reaktivigis ĝin por kongresa parolado, do iom per tio memorigas pri la iama aŭstra ŝtatprezidento Franz Jonas. La kongrestemo „Diskriminacio“, esprimo de la mondmalferma agado de UEA dum la lastaj jaroj, verŝajne forte kontribuis al certa interesiĝo flanke de neesperantistaj organizaĵoj el la tuta mondo pri la kongreso. Tio i. a. esprimiĝis en salutletero de Kurt Waldheim, la ĝenerala sekretario de UN, afablaj mesaĝoj de la prezidento de Islando, de la direktoro de la Sekcio de UN pri Homaj Rajtoj, de la ĝenerala direktoro de la Monda Konferenco de la Jardeko de UN por Virinoj (1980) kaj de la ĝenerala sekretario de Organizo de Amerikaj ŝtatoj. Ili same kiel ankaŭ la Internacia Demokratia Unuiĝo de Virinoj (sidejo en Berlin, Unter den Linden) kaj aliaj pli malpli detale eksplikis sian grandan intereson pri la kongrestemo. Teamo de sveda virina organizaĵo eĉ surbendigis partojn de la debato.

Certe, la kongrestemo „Diskriminacio“ estis tre aktuala, trafa kaj grava. Oni traktis en prelegoj, seminarioj kaj diskutgrupoj — entute dum pli ol 30 laborhoroj — la subtemojn rasa kaj etna diskriminacio, ekonomia diskriminacio kaj virina diskriminacio. La prelegoj kaj la rezultoj de la debatoj eldoniĝos. Malgraŭ la senduba politikeco de la temo la debatoj fluis tute trankvile kaj kolegece, se ankaŭ la vidpunktoj pri la kaŭzoj de la diskriminacioj kaj vojoj forigi ilin sufiĉe malsamis.
Per tiu kongrestemo UEA montris, ke ĝi ne staras ekster la gravaj nuntempaj temoj de la homaro, sed interesiĝas pri ili kaj volas kaj kapablas doni sian vidpunkton pri unuopaj trajtoj — ekzemple pri la lingva diskriminacio.

(daŭrigo de p. 122)

lande, kaj ĉiam denove estis kaptita de lia forta, vigla kaj samtempe tiel ĉarma, milda personeco. Jen, la personigo de la tradicioj, nuntempo kaj estonto de la soveta Esperanto-movado.

Al vi, kara amiko kaj kamarado, dankon pro ĉio, gratulojn tre elkorajn, sanan kaj feliĉan estonton kaj — espereble ankoraŭ multajn renkontojn kun ĉiuj, kiuj amas kaj bezonas vin. Detlev Blanke

La kulturatašeo Klaus Steinmar

Similajn ideojn ankaŭ esprimis diversaj diplomatoj, kiuj salutis la kongreson. Denove post 1969 ankaŭ alparolis reprezentanto de la ambasado de GDR en Svedio. La dua sekretario kaj kultura atašeo, s-ro Klaus Steinmar, salutis — en tute klara kaj bonkomprenebla Esperanto. (vidu la tekston sur p. 128) Do — la vere funda kaj detala prezento de la kongrestemo estis grava specifa trajto de la 65a. Krome ĉi-foje temis pri elekto de nova estraro kaj ĉio-ĉi okazis en tute trankvila atmosfero (kiel jam 1977 en Rejkjaviko). La Elekta Komisiono (Diaz — Britio, Kehlet — Belgio, Blanke — GDR) povis prezenti al la Komitato liston de kandidatoj, kiu trovis ĝeneralan akcepton.

Ĉar laŭ la nova statuto, UEA-prezidanto estrarano nur povas esti dum du sinsekvaj elektoperiodoj, prof. d-ro Humphrey Tonkin forlasis sian funkcion. Sed li restas en la estraro — laŭ lia deziro kiel simpla membro. La tuta kongreso per longega aplaŭdo dankis al li pro lia sindediĉa agado dum 6 jaroj. Elektiĝis nova prezidanto Grégoire Maertens, (Belgio) en la malnova estraro respondeca pri financoj. Vicprezidantoj de la nova gvidorgano estas d-ro Renato Ĉorsetti (Italio) kaj Baldur Ragnarsson (Islando). Ĝenerala sekretario elektiĝis d-ino Flora Szabo-Felsö (Hungario). Plue apartenas al la nova estraro, krom Humphrey Tonkin, ankaŭ Petar Todorov (Bulgario), Eliza Kehlet (Belgio) kaj Ursula Grattapaglia (Brazilo). Ankaŭ la nova estraro certe daŭrigos la vojon al mondreala universaliĝo de UEA.

La Komitato kunsidis dum la kongreso entute dum 18 horoj. Ĝi i. a. akceptis kiel novan landan asocion Ĉinan Esperanto-Ligon, elektis novajn C-komitatanojn (el GDR D. Blanke) kaj la novan Estraron de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (en la 9-kapa estraro, el GDR D. Blanke).

Ankaŭ ĉijare okazis multnombraj fakaj kunvenoj, sciencaj aranĝoj, kulturaj kaj distraj programeroj. El la entute pli ol 170 aranĝoj ni i. a. menciu la 11 prelegojn de la Internacia Somera Universitato: d-ro Werner Bormann (FRG): „Diskriminacio pro hejmlando", Baldur Ragnarsson (Islando): „La proza poemo kaj ĝia apliko en la Esperanta literaturo", Bojka Batalska (Bulgario): „La proteinoj de la maizo", prof. R. Wood: „Lingva diskriminacio sur poŝtmarkoj", Ye Junjian (P. R. Ĉinio): „La karaktero de la moderna ĉina literaturo", d-ro Wim de Smet (Belgio): „Abundoj kaj malabundoj de fokoj", prof. d-ro Humphrey Tonkin (Britio/Usono): „Juĝo kaj antaŭjuĝo en Otelo de Shakespeare", d-ro Béla Mészáros (Hungario): „Kelkaj demandoj pri la orientado, migrado kaj navigado de birdoj", prof. d-ro Magomet Isaev (USSR): „Pri la soveta sperto en la likvido de la so-

De maldekstre dekstren: Rudolf Hahlbohm, prez. de CLE; d-ro Detlev Blanke, sekr. de CLE; Y. Isobe (Japanio); P. Todorov (Bulgario)

Gratulojn de la prezidinto prof. Humphrey Tonkin al la nova prezidanto Grégoire Maertens

cia-kultura diskriminacio", prof. Andrzej Rzymkowski (Pollando): „Analizo de vilaĝaj arkitekturoj kiel pruvilo pri egaleco de etnaj kulturoj", prof. d-ro Carl-Stop-Bowitz (Norvegio): „Koralrifoj tropikaj kaj arktaj".

Krom tio kelkaj sciencaj prelegoj speciale enkondukis en la kongrestemon (d-ro J. C. Wells „Lingva diskriminacio", prof. d-ro J. Pool „Lingva egaleco, lingvo malegaleco kaj lingva diskriminacio", d-ro P. Daŝgupto „Lingva iĝnorado de virinoj: vorta kaj maniera", d-ro A. Godheir „Relegia toleremo kaj maltoleremo").

Pri sciencaj prelegoj vere ne estis manko dum tiu-ĉi kongreso. Ankaŭ la IIIa Internacia Esperantologia Konferenco, gvidita de Detlev Blanke, ofertis interesajn kaj forte vizititajn prelegojn: d-ro D. Blanke (GDR): „Esploroj pri la sociaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia parolantaro", d-ro J. Jermař (ČSSR): „Nacia kaj internacia kulturo — nacia kaj internacia lingvo", M. Ĝivoje (Jugoslavio): „Sociologiaj analizoj pri la strukturo de la nuntempa Esperanto-movado", prof. d-ro J. Pool (Usono): „La ekonomiaj avantaĝoj de planlingvo: decidteoria perspektivo". Unuan fojon dum Universala Kongreso oni ankaŭ invitis svedajn lingvistojn kaj informis ilin pri Esperanto kaj la funkciado de planlingva kongreso. Prelegis en siaj naciaj lingvoj d-roj Vilborg (svede), Wells (angle), Blanke (germane).

Multaj aliaj aranĝoj servis al la diversfakaj interesoj de la kongresanoj. Kunvenis i. a. la Akademio de Esperanto (kiel ĉiam, la diablo scias pro kio, nepublike), artistoj, aŭtomobilistoj, CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado), delegitoj de UEA, fervojistoj, filatelistoj, instruistoj, sciencistoj, matematikistoj, medicinistoj, muzikistoj, naturistoj, ornitologoj, radio-amatoroj, skoltoj, vegetaranoj, veteranoj k. t. p. La kunveno de MEM (vidu la rezolucion) substrekis la neceson daŭrigi la malstreĉiĝon.

Krome ne mankis lingvo-kursoj (pri la sveda lingvo kaj Če-metoda por Esperanto), ekspozicioj (pri la laboro de UN kaj UNESKO rilate al diskriminacio), interkona vespero, kongresbalo, akcepto ĉe la urbestro (en la nobelpremia salonego), infana kongreseto, junulara vespero, aŭkcio de brokantaĵoj, ekskursoj k. a. Dum la kulturaj vesperoj prezentiĝis konataj artistoj kiel Zuzanna Kawulok (folkloraj instrumentoj el Pollando), Jadwiga Gibczýnska (monologo pri Zamenhof „Rememoroj"), koncertoj de Veselin Damjanov kaj Bożena Zborowska, pupteatro de Rabka (Pollando) kaj la Pola Esperanto-Teatro (Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynski en „Malfermu la pordon" de K. Cholinski).

Neforgesebla estis ankaŭ la publika nekongresa manifestacio de la svedoj okaze de la 35a datreveno de la ĵeto de la atombombo sur Hirošimon la 6an de aŭgusto 1945. La manifestacion ankaŭ partoprenis esperantistoj, parolis japano, tradukita de sveda esperantisto.

La delegitaro de GDR partoprenis sennombrajn kunsidojn en la komitato, diversaj komisionoj k. t. p. kaj esprimis sian vidpunkton pri la koncernataj temoj. Pri tio estis eĥo kaj en Svedio (unupaĝa artikolo en la organo de la laborista partio komunista „Norrskens Flammaŭ de 12. 8. 80) kaj en GDR. Jam antaŭ la kongreso kelkaj gazetoj de GDR informis, estis radiointervjuo. Post la kongreso okazis plua intervjuo kaj entute aperis pli ol 20 artikoloj.

Entute la kongreso estis vere tre sukcesa kaj enhavoriĉa. La 66a Universala Kongreso de Esperanto okazos 1981 en Brazilio, ĉefurbo de Brazilo kaj la 67a 1982 en Antverpeno.

D. B.

36-a TEJO-Kongreso

Ĝi okazis de la 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto 1980 en la finna urbeto Raŭma, kvazaŭ parto de la tradicia punto-semajno, popolfestivala finna aranĝo. Partoprenis la kongreson entute 332 gejunuloj el 29 landoj, inter ili la prezidanto de la Junulara Komisiono de CLE, Michael Lennartz.

Adaptiĝante al la finnurba festivalo la kongreso elektis la temon „Popolaj tradicioj en la nuntempo“ kaj traktis diversajn aspektojn de tiu kaj aliaj temoj en prelegoj, seminarioj kaj diskutgrupoj. Interesa provo debati pri problemoj de la Esperanto-movado el junuleca rigardo estis la seminario „Esperanto dum la 80aj jaroj“. Dum longaj komitataj kunsidoj oni akceptis diversajn decidojn kaj rezoluciojn. Pro la enoficiĝo en la Centran Oficejon de UEA de Stefan McGill, la ĝisnuna TEJO-prezidanto, oni devis elekti novan. Elektiĝis Csaba Lendvay el Hungario. En la naŭkapa estraro de TEJO i. a. ankaŭ figuras Michael Lennartz (GDR) kaj T. J. Kudrewicz (Pollando). Aliĝis al TEJO kiel novaj landaj sekcioj la esperantistaj junularaj organizaĵoj el Flandrio (Belgio) kaj Slovakio (ČSSR). Pozitive oni ankaŭ povas noti la akcepton de letero al la Tuteŭropa Konferenco pri kunlaboro de junulaj kaj studentaj organizaĵoj, kiu dum oktobro 1980 okazis en Budapeŝto.

Elstarigenda estas la fakto, ke la TEJO-kongreson partoprenis 14-kapa soveta junulara grupo de ASE, kiu ankaŭ faris filmon. La 37a TEJO-Kongreso okazos 1981 en Oaxtepek, Meksikio.

Internacia Junulara Renkontiĝo en Potsdam

La Junulara Komisiono de CLE invitas al Internacia Junulara Renkontiĝo de 10.—15. 5. 1981 en la tradiciriĉa kultura urbo Potsdam. La kostoj estas 100 markoj (plena pensiono, en kabanoj). Oni ofertas ekskursojn, seminariojn, debatojn pri Esperanto en la 80aj jaroj kaj multon alian. Petu aliĝilojn de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, 1080 Berlin, Charlottenstraße 60.

Kongresa rezolucio

Universala Esperanto-Asocio, kunsidante en Stokholmo de la 1-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1980, dum la 65a Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestas pli ol 1800 partoprenantoj el 51 landoj, notante, ke la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, laŭ la Artikolo 1 de ĝia Ĉarto, inkluzivas realigon de internacia kunlaborado „por solvi internaciajn problemojn de ekonomia, socia, kultura aŭ humaneca karaktero kaj por antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio", kaj ke similaj principoj animas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj postajn internaciajn homrajtajn aktojn;

memorigante pri la agado de Unuiĝintaj Nacioj en la Jardeko de Luktado por Forigo de Ĉiuj Formoj de Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kaj pri la laboro de Universala Esperanto-Asocio en ties kadro, priskribita en la laborplano pri la Jardeko akceptita de la Asocio en 1974;

memorigante same pri la grava kontribuo de UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj al forigo de ĉiuj formoj de diskriminacio;

atentigante pri la laboro de UN en la kadro de starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo kaj en kreado de amikaj rilatoj inter la popoloj bazitaj sur la respekto al la principo de egalaj rajtoj;
konstatas, ke

1. la problemo de diskriminacio surbaze de lingvo estas intime ligita al aliaj specoj de diskriminacio, kaj ke tiuj specoj de diskriminacio kutime havas siajn lingvajn dimensiojn;
2. tamen ankaŭ diskriminacio surbaze de lingvo estas klare distingebla kiel aparta problemo, kiu estas ofte konfuzata kun rasa/etna diskriminacio sed efektive havas siajn unikajn ecojn;
3. okazas lingva diskriminacio, se el du grupoj havantaj malsamajn proprajn lingvojn, la unua devas lerni kaj uzi la lingvon de la dua, dum la dua ne bezonas lerni la lingvon de la unua;
4. lingve diskriminaciataj povas esti ne nur lingvaj minoritatoj interne de la ŝtatoj, sed en monda kadro ankaŭ sendependaj nacioj kaj ŝtatoj;
5. lingvan diskriminacion praktikas tiu, kiu uzas sian propran lingvon por ĉiuj kontaktoj kun alilingvanoj, tiel devigante ilin uzi tiun lingvon;
6. lingvan diskriminacion suferas tiu, kiu estas devigata de alia popolo uzi ties propran lingvon en difinitaj sferoj de la vivo (ekzemple en edukado, en la profesio, en internaciaj kontaktoj);
7. lingva diskriminacio inter ŝtatoj ofte manifestiĝas en la interna lingva politiko de internaciaj organizoj, kiuj favoras iujn naciajn lingvojn kiel laborlingvojn (kaj sekve favoras iujn ŝtatojn super aliaj), tiel ekskluzivante aliajn lingvojn, ofte la lingvojn de la malpli fortaj popoloj kaj ŝtatoj;

atentigas pri la signifa rolo, kiun povas ludi la Internacia Lingvo Esperanto en la forigo de lingva diskriminacio kaj en starigo de kunlaboro inter ŝtatoj kaj popoloj en spirito de egaleco;

atentigas, ke en interna lingva politiko de internaciaj organizoj la utiligo de Esperanto prezentas nepre praktikan rimedon por forigi diskriminacion surbaze de lingvo kaj por faciligi egalecajn kontaktojn inter la diversaj ŝtatoj-membroj;

alvokas al la diversaj ŝtatoj kaj al internaciaj organizoj, ke ili serioze kaj science esploru la atingojn kaj potencialon de la Internacia Lingvo Esperanto kiel rimedo de internacia komunikiĝo cele al realigo de la principoj de la Ĉarto de UN, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj internaciaj aktoj.

Noto: Krome, dum la Kongreso en Stokholmo, la Komitato de UEA akceptis kvar apartajn rezoluciojn, kiuj temas pri la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj, kontraŭvirina diskriminacio, lingva problemo en la sporto kaj propono pri Esperanto en la Monda Konferenco de Turismo (sept. 1980).

Alparolo de la GDR-Kulturataŝeo

Estimata sinjoro prezidanto! Gesinjoroj!

Permesu al mi, transdoni al vi — en la nomo de la ambasadoro de Germana Demokratia Respubliko en Svedio, ekscelenco doktoro Wolfgang Kiesewetter — la plej bonajn salutojn okaze de la 65a Universala Esperanto-Kongreso. Ekde pli ol naŭdek jaroj la noblaj celoj de doktoro Zamenhof — utiligi unu lingvon por tutmonda interkomunikado — trovas ĉiam pli da adeptoj dank' al la aktivaj klopodoj de la esperantistoj. Esperanto sukcese evoluadas kaj kontribuas al la internacia komunikado. La Esperanto-movado tiel ĉiam pli kaj pli fariĝas faktoro de la internacia batalo por paco, popola interkompreniĝo, kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio, kiel pruvas via kongrestemo.

Tiujn humanismajn celojn ankaŭ sekvas la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko.

La delegacio de GDR — pri tio mi certas — laŭpove subtenos la celojn de la kongreso.

Al la kongreso mi deziras sukcesan laboron.

El skribaj salutoj al la kongreso:

„... Tamen, mi deziras certigi al vi, ke ni sekvos vian laboron kun granda interesiĝo. Efektive, la temo de la Kongreso rekte rilatas al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj por kontraŭbatali ĉiujn formojn de diskriminacio kaj, tute specife, al la aktiveco entreprenita en la kadro de la Jardeko de Agado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. Mi deziras al la Kongreso sukceson en ĝia laboro. Mi estus tre danka, se vi bonvolus sendi al ni ĉiujn koncernajn dokumentojn, inkluzive de la fina raporto pri la Kongreso."

Theo C. van Boven,
dir. de la Sekcio de UN pri Homaj Rajtoj

„... La temo, kiun vi elektis kiel temon de la Kongreso, estas profunde ligita al la plimulto de la grandaj debatoj de nia epoko, kaj tial ĝi estas tre taŭga por asocio, kiu dediĉis sin al plivastigo kaj profundigo de la komunikiĝo kaj kompreniĝo inter la homoj. Por via Asocio mi havas la plej grandan respekton, kaj ĝiaj celoj certe harmonias kun tiuj de la Jardeko por Virinoj — egaleco, disvolviĝo kaj paco .... Mi estas certa, ke diskriminacio surbaze de sekso estos ekzamenita kaj vaste pridiskutita, kaj mi tre interesiĝos pri eventuala raporto pri la diskutoj, se vi eldonos ion tian poste. La rasismo restas, bedaŭrinde, unu el la hontindaĵoj de nia epoko, kaj mi estas certa, ke ankaŭ ĝi ricevos grandan atenton. Aparte interesas min la konstato, ke en via tagordo troviĝas ankaŭ la ekonomia diskriminacio inter la ŝtatoj ..."

Lucille M. Mair
ĝen. sekr. de la Monda Konferenco (1980)
de la Jardeko de UN por Virinoj

Rezolucio de la kunveno de MEM

La partoprenantoj:

- *aprobas la raporton de la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario de MEM,*
- *konstatas ke en la nuntempa monda situacio estas necese pli bone mobilizi la esperantistaron por la agado de MEM, uzante la eblecon de la Internacia Lingvo,*
- *subtenas ĉiujn paŝojn de internaciaj organizoj por daŭrigi la traktadojn pri la malarmado, por plena realigo de Decidoj de Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo,*
- *komisias la estraron de MEM serĉi eblecon por garantii la partoprenon de MEM-delegitaroj en internaciaj aranĝoj cele al pliaktivigo de la monda movado de pacadeptoj por gardi la pacon.*

Dro. Imre Pethes
prezidanto de MEM

Vigla GDR-gazetaro pri la 65a UK

Oni entute povas konstati, ke en GDR la gazetaro pli kaj pli ofte raportas en pli kaj pli longaj kontribuoj pri Esperanto kaj konkretaj Esperantaj okazintaĵoj. Ĉi-jare almenaŭ 20 artikoloj aperis pri la 65a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Estas notinde, ke sole 3 oni trovas en la partia ĉeforgano „Neues Deutschland“ (2 x 4. 8. 80, 11. 8. 80), krome en „Der Morgen“ (3 x), „Der Demokrat“, „Tribüne“, „Norddeutsche Neueste Nachrichten“, „Mitteldeutsche Neueste Nachrichten“, „Bauernecho“, „Norddeutsche Zeitung“, „Schweriner Volkszeitung“, „Das Volk“, „Neuer Weg“, „Ostsee-Zeitung“, „Thüringer Tageblatt“ k. a.

Bedaŭrinde la gazetaro havis malfacilon decidi, ĉu estis la 63a, 65a aŭ eĉ 68a kongreso. „Der Demokrat“ (Schwerin, (4. 8. 80) skribas pri 63a, „Neues Deutschland“ (4. 8. 80) pri la 68a, kaj nur „Der Morgen“ (15. 8. 80) sciis bone, ke ĝi estis la 65a. „Tribüne“ (5. 8. 80) preferis ne fiksi la numeron. Ampleksan raporton presis „Wochenpost“ en sia n-ro 35.

Gratulo al „der esperantist“ de la MEM-prezidanto

Ni ricevis jenan afablan leteron de **d-ro I. Pethes:**

„Grandan laŭdon mi ŝuldas al la redakcia komitato kaj kunlaborantoj de ‚der esperantist' okaze, ke aperis la 100-a numero de via revuo.

Ekde longa tempo mi kun granda atento legas vian revuon, kiu en la enhavo bele evoluis kaj la ekstera aperformo estas tute konvena por la fikso de celo.

La publikigitaj artikoloj certigas bonan informon por la legantoj.

Via revuo estas ĉiam redaktita kun bona nivelo kaj por la sukcesplena efektivigo de viaj celoj mi deziras multajn prosperojn.“

Apelacio el Budapeŝto

La kunsido de la prezidio de la Monda Packonsilantaro, okazinta de la 8a ĝis 10a de majo 1980 en Budapest, akceptis jenan apelacion:

Atento — militdanĝero!

La popoloj de la mondo estas provokataj, la malstreĉiĝo estas minacata, akcelerigas la armado-konkuro, kaj per tio estas malfermita la vojo al milito.

Tiun provokon oni devas haltigi. Ni renovigu sur ĉiuj ebenoj la dialogon por restarigo de la reciproka konfido kaj por komunaj agadoj. Hodiaŭ, okaze de la 35a datreveno de la venko super la hitlera faŝismo kaj la ĉesigo de la Dua Mondmilito en Eŭropo, la Monda Packonsilantaro apelacias solene:

Al ĉiuj, kiuj meze de rubo kaj cindro, ĵuris fari ĉion por malebligi novan mondan incendion!

Al ĉiuj, kiuj abomenas la frenezon de konkurarmado!

Al ĉiuj, kiuj profunde maltrankviliĝis pri la daŭre plimultiĝanta apliko de perforto en la internaciaj rilatoj!

Al la junularo, kiu havas rajton je vivo en pli bona mondo!

Al la popoloj kaj registaroj de la mondo!

Atento — militdanĝero!

Militoj ne estas neeviteblaj. Ankoraŭ ne estas tro malfrue haltigi la senbridan armadon, ankoraŭ ne estas tro malfrue, proskribi[1]) la instalon de novaj nuklearmilaj deponejoj, aparte en la koro de Eŭropo; sed estas plej urĝe, stopi la politikon de perforto kaj de la minacado per blokadoj, embargoj, bojkotado kaj militprovokoj.

Savi la malstreĉiĝon, batali por la rekomenco de la traktadoj pri malarmado kaj por justa novformigo de internaciaj ekonomio-rilatoj — jen la plej nobla devo de ĉiu homo.

Nek ideologio nek diferencoj en opinioj kaj kredoj malhelpu malferman dialogon kaj koncentritajn agadojn de tiuj, kiuj estas maltrankviligitaj pri la rapide malboniĝanta internacia situacio.

Ni ignoru ĉion kio dividas nin, ni strebu al tio, kio nin unuigas. Ni alvokas al komuna agado, por malebligi novan mondmiliton.

---

[1]) germane: ächten

Monda Packonsilántaro
8. — 10. majo 1980, Budapest

Denove en „Moscow News“

Ni trovas denove Esperanto-materialojn en Moscow-News, la konata revuo de Soveta Unio. Al n-ro 18 (2902), 4-a de majo 1980 (angla eldono) oni aldonis specialan suplementon „omaĝe al la 110-jara datreveno post la naskiĝo de Vladimir Iljiĉ Lenin“.
En n-ro 24 (2908), 15a de junio 1980 troviĝas speciala suplemento „omaĝe al la 35-jara datreveno post la venko super la faŝismo“. Valoraj dokumentoj kun ilustraĵoj. Ili estas senpage haveblaj ĉe Centra Laborrondo.

Apelacio el Sofio

La 23an de septembro 1980 2260 partoprenintoj de la Monda Parlamento de la Popoloj por la Paco, el 134 landoj kaj de 100 internaciaj organizaĵoj (inter ili Mondpaca Esperantista Organizaĵo, MEM) akceptis jenan apelacion:

„La popoloj de la mondo estas profunde maltrankviligitaj. Neniam antaŭe la danĝero de nuklearmila monda incendio estis tiel granda kiel nun. La nuklea armado, la amasigo de mortigaj armiloj alprenis krizigajn ampleksojn. Per plua akcelo de armado povus ekesti eksterordinare danĝera situacio, minacanta la homaron per likvido. La ‚nova nuklearmila strategio' estas grandskalia trompo-manovro: Oni volas ŝajnigi al la popoloj, ke eblus konduki limigitan respektive regionan nuklearmilan militon, sen provoki mondvastan nuklean katastrofon.

Ni decide malakceptas tiujn danĝerajn malhomajn planojn.

Ekde pli ol tri jardekoj la popoloj sukcese malebligis la eksplodon de mondmilito, kaj ili sindone batalis por malarmado kaj malstreĉiĝo — ili rifuzas partopreni tiajn maĥinaciojn. Ili postulas: ĉesu akumuli la armilojn, ĉesu tintadi la sabrojn!

Finon al agresoj kaj minaco de per forto. La danĝero de nuklearmila milito devas esti forigata!

Ni apelacias al la prudento kaj respondecemo de ĉiuj politikistoj kaj ŝtatistoj, ni apelacias al la registaroj:

Neniujn novajn armado-programojn! Ĉesu la produktadon de novaj specoj de amasmortigiloj — raketoj, de neŭtronaj armiloj, kemiaj kaj de ĉiuj aliaj armilspecoj. Reduktu la arsenalojn! Kondamnu la nukleajn armilojn! Intertraktadu! Ni apelacias al ĉiuj, al kiuj la paco estas kara: Ne sufiĉas esti konsternita! Ne sufiĉas esti zorgoplena! La popoloj havas la potencon gardi la pacon. Ĝi estas ilia baza rajto. Nun oni devas agi!

Ni haltigu tiujn, kiuj puŝas nian mondon ĉiam pli proksimen al atoma abismo.

Ni forigu ĉion dividan! Ni kuniĝu, por forigi la atommilitan danĝeron, unufoje por ĉiam. Pli laŭte ol iam ajn antaŭe eksonu nia voĉo!"

MEM en packonferenco de GDR

La 10-an de oktobro 1980 en Berlin kunvenis la Packonsilantaro de GDR por trakti la rezultojn de la Monda Parlamento de la Popoloj, okazinta dum septembro ĉi-jare en Sofio. La kunvenon en Berlin laŭ speciala invito partoprenis la membro de la Internacia Komitato de MEM, Jürgen Hamann. Detlev Blanke, kiu estas membro de la Packonsilantaro, estis malhelpita partopreni.

Kiel oni povas legi en „Neues Deutschland" de 11./12. oktobro 1980, paĝo 7, Jürgen Hamann dum la diskuto „certigis, ke la membroj de la Esperanto-movado en GDR vidas sian taskon en tio, senmaskigi la fortojn puŝantaj al milito, menciante „nomojn kaj stratnumeron". En la artikolo oni krome mencias, ke Jürgen Hamann estas membro de la Internacia Komitato de MEM.

Bertalan FARKAS, hungara piloto-kapitano, sub gvido de V. N. Kubasov, soveta kosmonaŭto — kadre de internacia esploroprogramo INTERKOSMOS — la 26an de majo 1980 sukcese startis el Bajkonur (Sovetunio). La sekvan tagon ili renkontiĝis kun kosmostacio SALJUT-6, kie ekde 50 tagoj laboras du sovetaj kosmonaŭtoj, L. Popov kaj V. Rjumin.

Laŭ gazetara informo

Ĉu la unua esperantisto en la kosmo?

Jes! Kaj tion mi diras tute sincere. Dum pli ol dek tagoj ni estis samklasanoj, ni aviadas per la sama aviadilo kaj ni okupiĝis pri la sama lingvo t. e. pri Esperanto. Ĉu li estas esperantisto? Mi ripetas, ke jes, sed estas pli bone se mi demandos lin mem, post la surteriĝo. Liaj vortoj valoras pli ol mia rememoro. Kion tamen diri anticipe?

En la lernejo de ĉaspilotoj — dank' al mia agado — preskaŭ ĉiuj miaj kolegoj ekhavis rilatojn kun Esperanto. Ĉiuj ellernis la plej uzatajn esprimojn en Esperanto, sed Bertalan Farkas ne estis kontenta pri tio ĉi. Li serioze eklernis la Internacian Lingvon el la lernolibro de Julio Baghy. Li parolis kun mi ofte en Esperanto. Mi organizis eĉ ekzamenon, kio estis por ni ĉiuj granda surprizo, ĉar li perfekte regis la materialon difinitan por la porokaza ekzameno. Tio okazis en Sovetunio, en jaro 1971.

Verŝajne ankaŭ vi ĉiuj demandus: Kaj kion li faras nun? Ĉu li parolas Esperanton ankaŭ nun? Ni ekscios ankaŭ tion.

Laŭ József Horváth,
El „Budapeŝta Informilo" 6/80

Detlev Blanke

Informado kaj argumentado III

(daŭrigo el „der esperantist" 5/1980)

2.2. Pri terminoj[15])

La neunueca, malĝusta kaj fuŝa mikso de diversaj terminoj malhelpas la komprenon de argumentoj kaj kondukas al nenecesaj miskomprenoj.

Pro tio ni ofertas praktikan klasifikon de kelkaj terminoj: Por nia celo oni povas klasifiki lingvojn ĉefe laŭ ilia **genezo** kaj laŭ ilia **regiona funkcio:**

A) Laŭ la genezo oni povas klasifiki:

1. **Etnaj lingvoj,** t. e. lingvoj, kiuj estas ligitaj al la evoluo de triboj, gentoj, popoloj, etnoj, nacioj. Oni ĝenerale parolas pri „naciaj" aŭ „popolaj lingvoj".

2. **Planlingvoj,** aŭ konstruitaj lingvoj (planned language, constructed language).

La termino „planlingvo" (germane: Plansprache) estas unue uzita de E. Wüster[16]) kaj pli kaj pli disvastiĝas en la interlingvistika literaturo. Temas pri lingvoj, kiuj ne ĉefe spontane evoluis, kiel la etnaj lingvoj, sed estas laŭ certaj modeloj konscie kreitaj de la homo. Plej

konata estas Esperanto (1887) de L.L. Zamenhof. Etnaj lingvoj ofte estas nomataj **„naturaj'** lingvoj kaj kontrastataj al la planlingvoj, kiuj estas nomataj **„artefaritaj"** lingvoj (artificial language; langue artificielle; künstliche Sprache; Kunstsprache; iskusstvennyj jazyk). „Artefaritaj lingvoj" ankaŭ estas formaligitaj simbol-lingvoj kaj komando- aŭ programlingvoj por dato-prilaboraj elektronaj instalaĵoj komputiloj). Konataj estas i. a. ALGOL, COBOL, FORTRAN kaj ŝajne por tiuj sistemoj la termino „artefarita lingvo" estas taŭga, sed ne por planlingvo kiel Esperanto, ĉar, uzante la nociojn „artefarita" aŭ „natura" lige al etnolingvoj aŭ planlingvoj „artefarita" ne malofte kunesprimas negativan koncepton kiel „neevolukapabla, senesprima, pala", sed „natura" subkomprenigas la nociojn „esprimpova, evolukapabla, kolorriĉa" k. t. p. Ĉar la atributoj „natura, artefarita" estas tiom ligitaj al emociaj sentoj netaŭgaj por sobra scienca diskuto, aŭ oni plene rezignu je ili aŭ plene agnosku, ke en ĉiu lingvo estas konstatebla pli malpli alta grado de konscia influo de la homo, de „artefariteco", kiel jam antaŭlonge atentigis H. Schuchardt[17]) kaj O. Jespersen[18]). Ŝajne, la terminoj „etna lingvo" (aŭ etnolingvo) kaj „planlingvo" tute taŭgas por eviti tiajn nedeziritajn emociajn kunsignifojn.

B) Laŭ la regiona funkcio de lingvoj oni povas i. a. klasifiki en:

1. **naciaj lingvoj,** kiuj plej ofte ankaŭ estas ŝtatlingvoj, ekzemple la bulgara en Bulgario aŭ, kiel en multnaciaj ŝtatoj, estas la gepatra lingvo de nacio loĝanta plej ofte (ne ĉiam) sur difinita teritorio.

2. **internaciaj lingvoj,** ankaŭ erarige ofte nomataj „mondlingvoj". „Internacia" en ĉi tiu senco signifas „interŝtata". Internaciaj lingvoj povas esti:

a) etnolingvoj (ekz. la angla, franca, rusa);

b) planlingvoj, kiel Esperanto. Tiuj planlingvoj ankaŭ ofte estas nomataj „mondaj helplingvoj" (auxiliary language; langue auxilière; Welthilfssprache; vspomogattelnyi jazyk) aŭ, precipe antaŭ kelkaj jarcentoj, oni parolis pri „universalaj lingvoj" (langues universelles) kaj kelkfoje per tio ankaŭ nomis unusolajn tutmondajn lingvojn de la unuiĝinta homaro (kp. B 4). La termino „helplingvo" denove estas erariga, ĉar ĝi ofte subkomprenigas, ke tiuj lingvoj nur povas ludi helpservojn en la internacia lingva komunikado, do ne samvaloras laŭ tiu vidpunkto kun naciaj lingvoj en la funkcio de internacia lingvo. Tamen „helplingvo" nur volas certigi, ke tiuj lingvoj estu uzataj apud la gepatra lingvo, do ne aspiras anstataŭi ĝin en nacia skalo. Kelkaj lingvistoj motivigas tiun nocion per tio, ke ĝi ekskludas la miskomprenon, ke la lingvo volus anstataŭigi naciajn lingvojn.

3. Iun ŝtupon inter naciaj kaj internaciaj lingvoj ludas la **interpopolaj lingvoj,** kiel en Soveta Unio tiu lingvo estas la rusa etnolingvo funkcianta inter la unuopaj sovetaj respublikoj, kie ĉiuj lingvoj estas samrajte uzeblaj. En tiun grupon oni ankaŭ povus klasifiki la **regionajn interŝtatajn** lingvojn, kiel la araba en norda Afriko kaj la Svahilia en orienta Afriko.

4. La termino **„mondlingvo"** estu prefere rezervita por tiu lingvo, kiu, laŭ kelkaj sovetaj sciencistoj, en fora estonteco evoluos el la diversaj etnolingvoj al la ĝenerala, sola komuna lingvo de la homaro (Worldlanguage; vseobŝĉij jazyk).[19]) Oni devas substreki, ke la menciitaj

terminoj bedaŭrinde tamen estas uzataj tre malunuece, kio rezultigas diversajn gravajn miskomprenojn kaj malfaciligas la interlingvistikan diskuton.

C) Oni ankaŭ devas mencii, ke ekzistas tria, science nepravigebla klasifiko, **klasifiko laŭ „vivanteco“.**

Sub la influo de la darvinismo la germana lingvisto A. Schleicher[20]) komparis lingvojn kun biologiaj estaĵoj, kiuj naskiĝas, vivas kaj mortas. Sub lia influo oni do parolis pri

1. **vivaj** lingvoj, al kiuj kalkuliĝas ĉiuj aktualaj etnaj lingvoj kaj

2. **mortaj** lingvoj, al kiuj oni kalkulas la planlingvojn kaj ofte ankaŭ la latinan kaj aliajn antikvajn ne plu aŭ preskaŭ ne plu funkciantajn lingvojn.

Do ekzistas, bedaŭrinde ankoraŭ, eĉ en sciencaj diskutoj la serioj **„viva natura nacia/internacia lingvo“** kaj **„morta artefarita planlingvo/mondhelplingvo“.** Ŝajne sufiĉas atentigi ĉi-rilate je la brilaj studoj de H. Schuchardt[21]) kaj J. Baudouin de Courtenay[22]), kiuj jam antaŭ longa tempo diris ĉion necesan pri tiu temo. La moderna semiotika kompreno de lingvo kiel signa sistemo ne lasas spacon por tiaj romantikaj esprimoj kiel „viva“ aŭ „morta“ lingvo, ĉar lingvo estas socia fenomeno kaj ne biologia estaĵo.

Notoj

[15]) La parto pri terminoj estas iom prilaborita varianto de la artikolo el „Paco“ 1/1977 (Sofia), represita en „Esperanto: Lingvo, movado, instruado“, Berlin 1977, p. 13 — 15

[16]) Kp. E. Wüster: Internationale Sprachnormung, loko cit. p. 353

[17]) Kp. B. Schuchardt: Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung, en: Almanach der Akademie der Wissenschaften, Wien, 1904, p. 286

[18]) Kp. O. Jespersen: Nature and art in language, en: O. Jespersen, Selected Writings of Otto Jespersen, London 1962, p. 605 — 724

[19]) Kp. — A. T. Baziev, M. I. Isaev: Jazyk i nacija, Moskva 1973, p. 215 sekv.

— prefaco de E. A. Bokarev al E. Svadost: Kak vozniknjet vseobŝĉij jazyk, Moskva 1968, p. 4

[20]) Kp. A. Schleicher: Der Darwinismus und die Sprachwissenschaft, Weimar 1873

[21]) Kp. K. Schuchardt: Auf Anlaß des Volapük, Berlin 1888

[22]) Kp. — J. Baudouin de Courtenay: Zur Kritik der künstlichen Weltsprachen (veranlaßt durch die gleichnamige Broschüre von Karl Brugmann und August Leskin, Leipzig 1908)

— kp. ankaŭ la studon de V. P. Grigorev: J. A. Baudouin de Courtenay i interlingvistika, en: J. A. Baudouin de Courtenay (k 30-letij, so dnja smerti), Moskva 1960, p. 53 — 66

— kp. Frank Häusler: La sinteno de J. Baudouin de Courtenay al la problemo de mondaj helplingvoj. En: GDR-eldono de „Paco“ 1980, p. 32—33, germana versio en „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“, Berlin 5/1980

Daŭrigota

3 aranĝoj de la Somera Esperanto-Lernejo

Ke necesas interakordigi la instruplanojn kaj ekzamenajn regularojn por plifaciligi la diversŝtupan instruadon de Esperanto, ekkonsciis la organizantoj de la Somera Esperanto-Lernejo en Slovaka Socialisma Respubliko/ČSSR, Hungario kaj Pollando. Tio signifas, ke fininto de kurso A en unu lando povas daŭrigi la lernadon en ŝtupo B en alia lando k t. p. kaj fari la koncernajn ekzamenojn, kiuj estas reciproke agnoskataj de ĉiuj tri lernejoj. Ankaŭ 1981 funkcios la SEL-oj. Jen la detaloj:

1. Somera Esperanto-Lernejo en Košice, SELKO-81

SELKO-81 okazos ĉe akvobarajo de Dobšiná en suda parto de Slovaka Paradizo en belega montaro inter vilaĝoj Dedinky kaj Mlynky (en ambaŭ vilaĝoj vagonar-haltejoj). La haltejoj troviĝas ĉe la fervojo en direkto Banská Bystrica — Brezno — Dedinky — Mlynky — Margecany — Košice. Oni povas veturi al Poprad kaj de tie per aŭtobuso (40 km).
Instruado: la lernejo organizas kursojn A, B, C kaj D.
Programaj specialajoj: ekskursoj al Slovaka Paradizo, kolektado de fungoj, boatado.
Loĝigo: turisma, en 4-litaj lignaj kabanetoj en kampadejo ĉe vilaĝo Dedinky. Eblas tendumi en propraj tendoj.
Kotizoj: 1400 kronoj. Al tendumantoj oni dekalkulas loĝejon. La kotizo inkluzivas loĝejon, manĝadon, kurskotizon, busekskurson kaj organizajn elspezojn.
Aliĝo: aliĝilojn kaj informojn petu de d-ro Elemir Erby, Dom umenia, Filharmónia, CS-041 23 Košice.

2. Somera Esperanto-Lernejo en Eger, SELE-81

SELE-81 okazos en interesa nordhungaria urbo Eger, kiu estas alloga el vidpunktoj historia, kultura kaj turisma.
Instruado: la lernejo organizas kursojn A, B kaj C.
Programaj specialajoj: varmakvaj banejoj, vingustumado, ekskursoj al arbaroj, orgenkoncerto.
Loĝigo: 4-litaj ĉambroj en studenta hejmo, preskaŭ en la mezo de la urbo.
Kotizo: 2000 forintoj. La kotizo inkluzivas loĝejon, manĝadon, kurskotizon el-spezojn por la ekskurso kaj organizajn elspezojn.
Aliĝo: aliĝilojn kaj informojn petu de Ernö Könczöl, Sóház u 13, H-3300 Eger, Hungario.

3. Somera Esperanto-Lernejo en Wladyslawowo, SELWO 81

SELWO-81 okazos en interesa ĉebalta, pola urbeto Wladyslawowo ĉe duoninsulo Hel norde de la belega urbo Gdansk. Restado ĉe Balta Maro, kvankam ne tro varma, tamen ĉiam alloga por mezeŭropanoj.
Instruado: la lernejo organizas kursojn A, B kaj C.
Programaj specialajoj: ekskursoj al duoninsulo Hel, Gdansk, Sopot kaj Gdynia, ŝipekskurso, restado sur plaĝo kaj banado.
Loĝigo: en turisma entreprena hotelo de sukerfabriko en Torun, 4-litaj ĉambroj.
Kotizoj: 3200 zlotoj. La kotizo inkluzivas loĝejon, manĝadon, kurskotizon, elspezojn por la ŝipekskurso kaj organizajn elspezojn.
Aliĝo: aliĝilojn kaj informojn petu de Andrzej Grzembowski, Komisiono pri Turismo de PEA, str. M. Sklodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz.

Unu monato en GDR

Laŭ invito de miaj germanaj geamikoj mi restadis en tiu ĉi lando de la 6a de junio ĝis la 5a de julio 1980. La unua mia renkontiĝo okazis en Berlino, kie mi prelegis antaŭ 60 Berlinaj esperantistoj pri Bulgario kiel turisma lando akompanita de lumbildoj. Ĉio bone sukcesis. La sekvontaj tagoj mi alvenis en Potsdam, kie okazis tre impona kunveno en E-klubejo, kie alvenis neesperantista publiko — tute junulara. Mia prelego daŭris pli ol 4 horojn, samtempe majstre tradukita de s-ino Ingrid Schödl. Estis grava sukceso, ĉar ni gajnis tiun ĉi junularon por nia ideo, kaj samtempe ili ekkonis Bulgarion. La sekvontajn tagojn — 11. — 13. julio mi estis en Neubrandenburg kaj prelegis en la kultura domo, kie mi konatiĝis kun tute juna generacio de tiu ĉi nova urbo. Krome, laŭ mia programo mi vizitis ĝemel-urbon Stavenhagen — proksime al Neubrandenburg. Tie mi renkontiĝis kun la gekolegoj de la loka gimnazio, kie ni starigis reciprokan kontakton por interŝanĝo de gelernantoj inter nia gimnazio en Kubrat kaj Stavenhagen 1981.
Fine de mia restado mi venis al Dresdeno, kie mi ankaŭ prelegis. Estis por mi kaj mia edzino (ŝi ankaŭ venis fine de junio al GDR) agrable, konatiĝi pere de Esperanto kun Germana Demokratia Respubliko.

(Laŭ materialo de Hristo Dimitrov

El Bulgario

Bulgara Kongreso en Plovdiv

La 40-a Jubilea Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio (BEA) okazis en Plovdiv de la 12-a ĝis 14-a de julio 1980. Ĝin partoprenis pli ol 2.300 delegitoj kaj gastoj. Oficialaj reprezentantoj estis venintaj por ĉeesti kaj saluti la kongreson de la Esperanto-asocioj de preskaŭ ĉiuj eŭropaj socialismaj landoj.

Plej entuziasme estis aplaŭdita la alparolo de k-do Nguyên Dúc-Quý el Vjetnamio, kiu kune kun k-do Dao Anh-Kha reprezentis Vjetnaman Pacdefendan Esperantistan Asocion (VPEA) en la Plovdiv-a kongreso.

Centra Laborrondo Esperanto (CLE) en Kulturligo de GDR estis deleginta tri funkciulojn por reprezenti Germanan Demokratian Respublikon en la bulgara kongreso, s-anojn Hans HEINEL (delegaciestro), d-ron Erich-Dieter KRAUSE kaj Jürgen HAMANN.

Ke Esperanto ludas gravan rolon en Bulgario tute klare montriĝis dum kaj ekster la kongresaj aranĝoj. La gazetaro kaj la televido amplekse raportis pri la kongreso. Tra la tuta urbo estis videblaj dulingvaj kongresaj afiŝoj, slogan-rubandoj kun priesperanta teksto. Sur la tereno de la fama „Internacia Foiro de Plovdiv" la gravaj kongresaj aranĝoj okazis, en foira pavilono donanta spacon por ĉirkaŭ 3.000 personoj. Kaj la halo preskaŭ plenis!

Altaj reprezentantoj de la bulgara ŝtato salutis la kongresanaron en tiu halo (Patrolanda Fronto, Centra Komitato de Komsomolo, Ministerio pri Popola Klerigo k. a.).

Ĝojiga estis ankaŭ la fakto, ke okaze de la Jubilea Kongreso en Plovdiv estis aperinta en la bulgara libromerkato tuta aro da novaj publicaĵoj: en lingvo Esperanto eldoniĝis en Sofio libro de Mercia MacDERMOTT pri Vasil LEVSKI, nacia heroo de Bulgario sub titolo „Apostolo de Libereco". La tradukon faris Nikola ALEKSIEV kaj redaktadon transprenis prof. Stojan ĜUĜEV. Ĉi tiu libro indas esti sur la librobreto de ĉiu esperantisto. Krome ĉarma malgranda libro estis eldonita fare de la Loka Kongresa Komitato de la 40-a BEA-kongreso, kolekto de poezio kaj prozo por infanoj, sub titolo „Floranta branĉeto". Ankaŭ ĝi estas nepre rekomendinda. Esperantomovadaj specialistoj sendube interesiĝos pri la aliaj tri publicaĵoj: Kr. SOFRONIEV prezentas sur entute 65 paĝoj la historion de la Plovdiv-a Esperanto-movado kaj la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio prezentas, en formo ofsetpresita, la „Priagada Raporto"-n. Dulingva estas la tria eldonaĵo de Nikola ALEKSIEV sub titolo (la esperantlingva) „Kvindek jarojn de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BuLEA), 12. 7. 1930 ĝis 12. 7. 1980".

Ankoraŭ multo favora povus esti raportita pri tiu ĉi jubilea kongreso, sed kie komenci, kie fini?

Tamen, laste, ion: La GDR-delegitaro havis eblecon viziti la novan INTERNACIAN ESPERANTO-KURSEJON en Pisanica/Rodopi-Montaro Tiu hoteistila montara domego, destinita por trejni Esperanto-instruistojn de Bulgario kaj alilando, estas la plej impona esperantista konstruaĵo, kiun oni iam kaj ie vidis. Kiam la kursejo en Pisanica malfermos sian pordon por ekfunkcii (venontprintempe) Esperanto gajnos ankoraŭ pli da agnosko kaj estimo en Bulgario kaj, supozeble, ankaŭ en aliaj landoj.

D-ro Erich-Dieter KRAUSE

Renkonto kun bulgaro

Antaŭ la somera paŭzo la Esperantogrupo de Potsdam aranĝis kun neesperantistoj el filmklubo, en kies klubejo la esperantistoj el Potsdam ĉiam kunvenas, renkonton kun la bulgara instruisto Hristo Dimitrov el Kubrat, urbo en nia partnera distrikto Ruse. Li prezentis multajn interesajn faktojn pri sia lando Bulgario, historiajn, geografiajn kaj vivstatajn kaj per lumbildoj ankaŭ pri la Rila-monaĥejo. Poste li respondis diversajn demandojn de la aŭskultantoj precipe de la neesperantistaj.

Al ĉiuj tre plaĉis la prezentado de Hristo Dimitrov. Fine la neesperantistoj esprimis surprizon, kiel bone, praktike funkcias Esperanto.

Ingrid Schödl

Broŝuro pri BuLEA

Unu el la fondintoj de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio, Nikola Aleksiev, prezentas en dulingva 40-paĝa broŝuro skizon pri la historio de tiu rimarkinda klasbatala organizaĵo. Ni planas represi la ĉefan enhavon en unu el la sekvontaj numeroj de „der esperantist".

Redaktas: Dieter Berndt

Legu kaj lernu! Lies und lerne! (6)

Ĉu vi scias kio estas?

AMFORO	estas	a) formo de amo; b) ornamaĵo por virinoj; c) antikva botelego el argilo; ĉ) insekto, kiu vivas en Afriko.
BANĜO	estas	a) frukto de tropika arbo; b) muzikinstrumento; c) speciala bano en kelkaj kuraclokoj; ĉ) tolo por kovri vundojn.
CIRUSO	estas	a) nuboj, kiuj aspektas kiel plumaro; b) nomo de stelo; c) frukto, simila al citrono; ĉ) insekto.
ĈIBUKO	estas	a) rivero en okcidenta Afriko; b) tendo ĉe indianoj; c) maŝinelemento; ĉ) turka pipo.
DIRKO	estas	a) instrumento, kiun uzas ŝtelistoj; b) parto de direktilo ĉe aŭtomobilo; c) norda cervo; ĉ) arbo.
EPITAFO	estas	a) speciala ritmo en poezio; b) surskribo sur tomboŝtono; c) sanktulo en Hindio; ĉ) formo de tagmento.

(Solvo en „de“ 1/1981)

Klarigoj

antikva	— antik, altertümlich
argilo	— Ton, Lehm
insekto	— Insekt
tropika	— tropisch
muzikinstrumento	— Musikinstrument (muziko + instrumento)
kuracloko	— Kurort (kuraci + loko)
tolo	— Leinen (Gewebe)
vundo	— Wunde
kovri	— bedecken, zudecken
plumo	— Feder (plum-ar-o = Federhaufen)
citrono	— Zitrone
maŝinelemento	— Maschinenteil (maŝino + elemento)
pipo	— Tabakspfeife
direktilo	— Steuer (direkt-il-o)
cervo	— Hirsch
ritmo	— Rhythmus
tomboŝtono	— Grabstein (tombo + ŝtono)
sanktulo	— Heiliger (sankt-ul-o)
tegmento	— Dach

Estona filio de ASE

La 26. 4. 1980 okazis en Tallinn la fonda konferenco de Estona Filio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. La estraron prezidis la estona klerig-ministro, Esperanto-veterano el la 1930-aj jaroj, Ferdinand Eisen.[1]) Li jam sciigis, ke aperos lernolibroj por memlernantoj kaj por lernejoj, vortaro Esperanta-estona, oni daŭrigos la eldonadon de estonaj verkoj en E-traduko, kaj okazos kursoj por instruistoj. Kunlaboros la ŝtataj kaj sociaj organizoj.

[1]) Komparu „der esperantist“ 5/80 (103), p. 97—98

Apudmoskva Esperanto-renkontiĝo

Pli ol cent esperantistoj el Moskvo, Ivanovo, Kalinin, Jaroslavl, Kaluga, Voronej, Leningrado, Minsk, Harkov kaj aliaj urboj kolektiĝis en apudmoskva urbo Ŝĉerbinka de la 1a ĝis la 4a de majo 1980 por partopreni tradician, ĉifoje jam jubilean 20an Centra-Rusian Regionan E-Renkontiĝon. Partoprenis ĝin ankaŭ eksterlandaj esperantistoj el Hungario, Nederlando, Francio.

Varia kaj interesa estis la programo de la renkontiĝo: sportaj konkursoj, koncertoj de E-kantoj, festa bankedo, dancoj, diversaj prelegoj dum ĉiutaga Esperanto-universitato. Estis montritaj diapozitivoj pri E-agadoj kaj pri vidindaĵoj de Vjetnamio kaj Francio.

La partoprenintoj de CRRER-20 sendis leteron al la usona prezidanto Carter, protestante kontraŭ militarisma politiko de usona administracio.

Dimitrij Perevalov, prezidanto de Moskva Internacia Esperanto-Klubo

Kunagu!

Internacia ekspozicio de infandesegnaĵoj dediĉita al la Internacia Tago de Virino okazos marte 1981. Bonvolu sendi desegnaĵojn ĝis la 1a de januaro 1981, indikante nomon, aĝon, sekson de la aŭtoroj kun subtitolo. Premiotaj la plej belaj. Respondo certa. Nia adreso: USSR 443099 Kujbiŝev, st. Kuibeŝeva 70, Oblastnoj Dom, rabotnikov prosveŝĉenija izostudija.

Nova literatura konkurso — temo „Paco“

Kujavi-Pomerania Societo pri Kulturo anoncas novan konkurson pri poezio aŭ prozo originala aŭ tradukita en Esperanton pri la temo „Paco“. La konkursaĵojn oni sendu ĝis 31. 3. 1981 al:

Kujawsko-Pomorskie Towarzystwo Kulturalne, Al. 1 Maja 20, PL-85-006 Bydgoszcz, Pollando. Aŭtoroj de la premiitaj konkursaĵoj partoprenos senpage la VI. Internacian Esperanto-Renkonton „Bydgoszcz-81“, ricevos diplomojn kaj objektajn premiojn. La plej bonajn konkursaĵojn oni ankaŭ publikigos en speciala kajero. La partoprenantoj de la nova konkurso „Paco“ estas petataj:

1) tajpi sian konkursaĵon kun interspaco kaj alsendi ĝin en du ekzempleroj;

2) la poeziaĵoj estu ne pli longaj ol du-paĝaj, la proze skribitaj konkursaĵoj — maksimume tri-paĝaj, kun maldekstr.-flanka marĝeno;

3) rajtigi la konkursan komisionon korekti aŭ mallongigi la premiitajn konkursaĵojn, destinitajn por publikigo.

8a SIS

De la 23a ĝis la 26a de aprilo 1980 en Pomiechówek apud Varsovio okazis la 8a Studenta Inerlingvistika Seminario. Gin partoprenis 50 studentoj kaj fakuloj el Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, F.R. Germanio, Hungario, Italujo, Pollando, Soveta Unio kaj Svislando. La seminarion aranĝis Socialisma Asocio de Polaj Studentoj/Studenta Interlingvistika Rondo ĉe universitato de Varsovio sub aŭspicio de CDELI (Centre de Documentation et d'Études sur la Langue Internationale), La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La aranĝo mafermiĝis per enkonduka prelego de Claude Gacond, direktoro de CDELI, pri ĝiaj celo kaj laboro, en kiu li raportis pri pli ol dekjara laboro por konservado kaj prizorgo de dokumentoj kaj libroj pri planlingvoj, baza laboro por la studoj de niaj serĉantoj. Sekvis prelegoj por difini la nociojn interlingvistiko kaj esperantologio. La seminario poste detale traktis problemojn de interlingvistiko kaj de apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko.

La sekcio interlingvistiko pritraktis multajn lingvistikajn, literaturajn kaj ĝenerale kulturajn temojn. Ekzemple traktiĝis **vortofarado en Esperanto** kaj diversaj unuopaj aspektoj de Esperanta gramatiko kiel pronomoj, adverboj, diftongoj kaj morfologia sistemo. Prezentiĝis ankaŭ prelego pri transskribo de fremdaj nomoj kaj pri la angladeve-

naj vortoj en la „hungara dialekto“ de Esperanto.

Rilate la **literaturon kaj kulturon de Esperanto** apartan mencion meritas la prelegoj far reprezentantoj de Literatura Foiro pri la rolo de Esperanta kulturo kaj la sekvaj viglaj diskutoj pri ĝi.

Prezentiĝis ankaŭ **sociaj aspektoj de planlingva literaturo** kaj sciencaj esploroj pri Esperanto-instruado al infanoj: la problemoj de denaska esperantiĝo, kaj diversaj tendencojn en interlingvistiko.

La sekcio **Esperanto en scienco kaj tehniko** komenciĝis per raportoj el Hungario kaj Ĉehoslovakio, kie jam kolektiĝis adresaro de fakuloj. Tie okazas traduko de fakaj artikoloj kaj prilaboro de fakterminaroj. Rilate komputarita en Hungario kaj estis prezentita tadon detale montriĝis la laboro jam funkciado de komputiloj kaj ilia utiligo por trovi semantikajn rilatojn inter vortoj, laboro helpa por klasifiki librojn laŭ enhavo.

Okazis kunvenoj de studentoj pri komputado kaj pri medicino, en kiuj oni pri la plua kunlaboro de samfakuloj interkonsentis. Oni povas diri, ke la prelegoj havis altan sciencan nivelon. La partoprenantoj tiel bone povis informiĝi pri la nuna stato de interlingvistiko.

Vendrede la **rektoro de la Varsovia universitato** akceptis delegacion de la seminario okaze de unversitataj tagoj; interalie la seminarianoj raportis pri la situacio de interlingvistiko en siaj ŝtatoj.

La seminario okazis en arbara ripozloko apud rivero, kiun laŭdire kelkaj eĉ uzis por boati dumnokte. Regis bona etoso kaj ekestis amikaj rilatoj inter la studentoj el oriento kaj okcidento. Al tio ankaŭ kontribuis la dancvesperoj, kies diskoteko bone amuzigis kaj dancigis. Post la seminario okazis komuna vizito de Varsovio, dum kiu oni vizitis la tombon de Zamenhof kaj la memormonumenton pri la getto, kaj por kelkaj invititoj viziton al universitataj instancoj en Lublino.

L. F. von Wunsch-Rolshoren
[Laŭ „Koncize“ 3 (32) 1980,
bulteno de okcidenteŭropaj landaj
sekcioj de TEJO]

V-a „Bydgoszcz-80“

En pola urbo Bydgoszcz dum la 28a de majo ĝis la 1-a de junio 1980 okazis la V-a Internacia Esperanto-Renkonto „Bydgoszcz-80“. Ĝin aranĝis okaze de la 1AGOJ DE BYDGOSZCZ la Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bydgoszcz. Partoprenis la Renkonton 330 alvenintaj gastoj el 11 landoj kaj pli ol 900 membroj de PEA, agantaj en 11 PEA-Rondoj en la urbo Bydgoszcz.

La riĉa programo konsistis i. a. el la Vespero „Bydgoszcz por la gastoj“ dum kiu prezentiĝis Esperanto-ensembloj el Bydgoszcz: „Verda Parnaso“, „Niaj Bardoj“ kun la programo „Kantu Baghy“ kaj Koruso de Malnova Kanto en Esperanto de Pedagogia Altlernejo. Dum la ŝipekskurso al urbo Torun okazis ankaŭ la vizitado de la urbo kaj folklora programo en Etnografia Muzeo de Torun. Premiojn dum la literatura konkurso pri la temo „PACO“ ricevis 8 aŭtoroj, el kiuj la ĉefan s-ino Vesna Skljer-Race el Beogrado (Jugoslavio). Okazis ankaŭ seminarioj por gvidantoj de Someraj Esperanto-Lernejoj kaj por gvidantoj de Internaciaj Kursoj de UEA – tiun gvidis red. Andrzej Pettyn. Oni popularigis „Literaturan Foiron“ aranĝante renkonton kun ĝiaj legantoj.

Ĉefan atenton prenis Internacia Konkurso por Esperanto-Kanzono. La ĉefan premion – Pokalon de Muzika Esperanto-Ligo gajnis Skolta Muzikensemblo „Esperanto“ el Garwolin kaj la duan premion ensemblo „Ora Monero“ el Bydgoszcz. La konkurson partoprenis 110 plenumantoj. Specialan Pokalon de Muzika Esperanto-Ligo ricevis „Niaj Bardoj“ pro la altnivela programo „Kantu Baghy“.

La programon kompletigis Internacia Vespero de Amikeco kun ensemblo „Vagabondoj“, koncerto en Pomerania Filharmonio, koncertoj en Popola Parko por loĝantoj de Bydgoszcz: de la Esperanto-muzikensembloj kaj de la Folklororkestroj el Ĉehoslovakio (Svit), Hungario (Eger, Gyula), Jugoslavio (Vinkovci) kaj Pollando (Istebna, Rybnik, Gliwice); junulara sesio kun programoj el Bulgario, Ĉehoslovakio kaj GDR. Dum ĉiuj-ĉi aranĝoj prezentiĝis 320 plenumantoj.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis tre valorajn Esperanto-eldonaĵojn speciale eldonitaj por la Renkonto: i. a. notlibro kun memorsurskribo, novan prospekton „Bydgoszcz“, kajeron kun premiitaj konkursaĵoj pri „PACO“, novan lernolibron „Esperanto por feriadoj“, „Turisman vortareton“, insignon „Tagoj de Bydgoszcz“. La 31an de majo poŝtoficejo Bydgoszcz-1 uzis specialan oficialan poŝtan stampon kun teksto V. Miedzynarodowe Spotkanie Esperanckie („V. Internacia Esperanto-Renkonto“).

La organizajn laborojn bone plenumis 60-persona Organiza Komitato sub gvido de mag. Andrzej Grzebowski – prezidanto de la Filio. Jam nun oni povas aliĝi al la VIa Internacia Esperanto-Renkonto „Bydgoszcz-81“, kiu okazos komence de junio 1981.

La organiza komitato

SAEST 1980

Tre instiga seminario pri „La vivomedio hodiaŭ kaj morgaŭ“ kaj pri „Problemoj de la faka lingvo kaj traduko“ okazis fine de aŭgusto en Ústí nad Labem sub aŭspicio de Ĉeha Esperanto Asocio.
La referaĵoj kaj kontribuoj de spertuloj el kvin landoj — Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario, Nederlando, GDR — denove pruvis la taŭgecon kaj avantaĝon de Esperanto por internacie trakti vivodecidajn problemojn de la nuntempa homaro, ne perdante tempon por tradukado.
Jam estas korpe senteblaj negativaj efikoj de troa industriigo en la ĉirkaŭaĵo de Ústí nad Labem:
Sur 1 km² de la basen-areo averaĝe falas jare 40 t da cindropolvo kaj preskaŭ 300 t da sulfa duoksido; infanoj estas ĉi-tie multe pli ofte trafataj de bronhito kaj pneŭmonio, suferas pro meza otito (inflamo de la oreloj) kaj sinusito (inflamo de enostaj faciaj kavaĵoj).
Ciuj industrie evoluintaj ŝtatoj portas respondecon por bona sanstato de la tuta naturo, por ke la homa vivo ne pereu, sed plivaloriĝu. Ĉeĥoslovakaj sindikataj kaj fakaj instancoj — menciindas la helpo de la entrepreno „Spolchemie“ al sukceso de la seminario — montras vojon al fruktodona internacia kunlaboro sur tiu-ĉi kampo.
Konsidere al la menciita ekologia temaro, profunde maltrankviliganta la aŭskultantaron, terminologiaj demandoj kadre de apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko (ekz. „Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo“; ĥemia kaj jura nomenklaturoj en la Internacia Lingvo) ne endanĝerigis nin pri la homa sorto, sed kontraŭe, konvinkis la interesulojn, ke nia lingvo kuŝas en ŝirme ĉirkaŭita lito, por ke neniu kaosa lingvokrea vento aŭ fulmo veku sanktan Skemismon.
Rezume — la seminario fortikigis la opinion, ke nur per daŭra aplikado de IL ankaŭ en sciencaj kaj teĥnikaj esplordiskutoj kaj originalaj publikaĵoj gajnas ambaŭ fenomenoj: internacia kunlaboro kaj internacia lingvo.

T. Dahlenburg

Komuna deklaracio

de partoprenantoj en la seminario „Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko“ aranĝita de la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeha Esperanto Asocio kunlabore kun la uzina sekcio de Ĉeĥoslovaka scienca-teĥnika societo Spolchemie Ústí nad Labem kaj okazinta en Ústí nad Labem, Ĉeĥoslovakio, en la tagoj 29a—31a de aŭgusto 1980.
La partoprenantoj, fakuloj-esperantistoj en nombro de 83 personoj el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Germana Demokratia Respubliko, Hungario kaj Nederlando traktis fakajn temojn de internacia karaktero en du sekcioj:
a) La vivomedio hodiaŭ kaj morgaŭ.
b) Problemoj de faka lingvo kaj tradukado.
Niajn konstatojn kaj rekomendojn ni resumas en la deklaracio:

A.

1. La politikajn, teĥnikajn kaj ekonomiajn intervenojn por limigi kaj haltigi poluciadon de la vivomedio devas akompani celscia kaj sistemeca edukado al zorgo pri la vivomedio en ĉiuj aĝkategorioj de la homa populacio.
2. La rilato „organismo-medio“ estu esplorata cele al daŭra perfektigado de sanitaraj kaj higienaj normoj, kiuj garantiu optimumajn kondiĉojn por la homa sano.
3. Sistemo de protektado de la vivomedio bezonas normojn, kontrolsistemon kaj kunlaboron sur internacia nivelo, ĉar ankaŭ la poluciado havas mondskalan karakteron.
4. Ĉar la ekologia problemaro havas internacian karakteron oni klopodu intensigi uzon de la internacia lingvo Esperanto por ĝia solvado.
5. La evoluo de la homa socio postulas pli intensan eluzon de la nun konataj energi-fontoj, kio rezultigas novajn damaĝojn por la vivomedio. Ni rekomendas sekvi malaltigon de la konsumbezonoj de energio per teĥnika perfektigo de teĥnologiaj procedoj, per altigo de efikeco de ĉiuj teĥnikaj ekipaĵoj, per reguligado, aŭtomatizado; ktp.
6. Ĉiuj procedoj kaj metodoj utilaj por restarigi kaj konservi la bonan vivomedion estu alireblaj por ĉiuj ŝtatoj sen kia ajn diskriminacio.
7. Ekologio kiel interdisciplina scienco estu rekonita kiel memstara fako; ĝi estu memstare studata kaj estu aplikata en la ŝtataj, komunumaj kaj entreprenaj organizaĵoj sub gvido de kompetenta specialisto-ekologo.

B.

1. En la movado ni lastatempe konstatas gravan interesiĝon pri la fakaj aplikoj de Esperanto.
2. Pozitivaj rezultoj de la faka aplikado de Esperanto grave dependas de la evoluigo de unuopaj faklingvoj. Estas necese, ke la ĝis nun disigitaj tiudirektaj celadoj estu unuece gvidataj de la movadinstitucioj.
3. La normiga procedo de la faklingvoj en Esperanto sekvu similajn procedojn nacilingvajn.
4. Lingvo-planado kaj faklingva normigo en Esperanto estu agnoskata kiel scienco preskriba.
5. Oni gardu skemisman karakteron de Esperanto, ĉar ĝi respondas al la strukturo de la lingvo; ĝi povas esti avantaĝe adaptita al la modernaj teĥnikaj rimedoj, precipe komputiloj.
6. Ni rekomendas teorie studi la morfologiajn principojn de faklingvoj kaj eduki novajn adeptojn por la terminologia laboro.

Ankaŭ 1981 SAEST

Post la tre sukcesa SAEST 1980 ni plezure informas, ke ankaŭ 1981 okazos SAEST. Jen informo ricevita el la Slovaka Socialisma Respubliko/ČSSR:

Scienc-teknika sekcio de Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko invitas vin al 3a seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, okazonta fine de aŭgusto 1981 en Žilina.

La seminariaj temoj:

— problemoj de faka aplikado, terminologiaj demandoj k. s.

— fakaj prelegoj.

La seminario estos tri-taga, sekvata de Turismaj Tagoj de Žilina. Kaptu la okazon samtempe ferii en la pitoreska montara ĉirkaŭaĵo de Žilina.
Dum la seminario programo ankaŭ por neesperantistoj.
Prelegontoj kontaktiĝu kun: Ing. Aleš Bednařik, Lotyšská 8, 834 00 Bratislava.

12a plenkunsido de CLE en Neubrandenburg

La ĉi-jare jam tria plenkunsido de la supera gvidorgano de la esperantistaro en Kulturligo de GDR okazis la 26an kaj 27an de septembro en Neubrandenburg. Jam la 25an okazis renkontiĝo de kelkaj prezidianoj de CLE kun membroj de la vigla Distrikta Laborrondo kun ĝia prezidanto **Werner Pfennig,** samtempe membro de la prezidio de CLE. Dum la renkontiĝo okazis spertinterŝanĝo pri problemoj de la distrikta laboro, kaj oni aŭskultis malgrandan raporton pri la 65a UK en Stokholmo. La programo de la plenkunsido de CLE mem, kiel kutime, estis tre plena.
Per granda aplaŭdo la membroj esprimis sian kontenton pri la distingo per la Honorinsigno de CLE de **Wally Graetz,** vidvino de la neforgesebla prezidinto de CLE, **Rudi Graetz.** Enkonduke la prezidanto de CLE, k-do **Rudolf Hahlbohm,** karakterizis la internaciajn eventojn okazintajn post la 11a plenkunsido. La sekretario de CLE, **d-ro Blanke,** informis pri konferenco, kiun organizis la Centra Komitato de la Socialisma Unuiĝinta Partio kun Kulturligo kaj dum kiu oni tre substrekis la valorajn internaciajn aktivecojn de la organizaĵo. Plue traktatis problemoj de la gvidado. Nepre estas plibonigenda la raportado al KL pri okazigitaj esperantistaj aranĝoj (statistikaj formularoj), nepre intensigenda la plutrakto de rezultoj de CLE-kunsidoj **(S. Linke)** por la subordigitaj gvidunuoj kaj vigligenda la informagado por kaj kun la respublika gazetaro **(W. Pfennig). D. Blanke** resumis la 16jarajn spertojn de pli ol 30 seminarioj por honoroficaj kadroj kaj **M. Lennartz** prezentis proponon pri reorganizo de la seminaria sistemo. Sekvis raportoj de la Distriktaj Laborrondoj pri faritajoj kaj planoj por 1981. Gravaj punktoj ankaŭ estis la IIIa Centra Konferenco de la esperantistoj de GDR 1981, raportoj pri la Esperanto-kongresoj ĉi-jaraj en Stokholmo (UEA), Rauma/Finnlando (TEJO), Plovdiv (BEA), Bratislava/AESSR kaj pri la scienca seminario en Usti n. L.

Tiu konferenco ne estis tiel elstara kiel la 11a kun profesoro Meier, sed ne malpli grava, ĉar praktike labora.

Informoj el GDR

Distrikta renkontiĝo en Potsdam

La 10an kaj 11an de majo 1980 okazis en Neuruppin la ĉijara distrikta renkontiĝo.
Partoprenis 60 Esperanto-amikoj el la distriktoj Potsdam, Berlin kaj Frankfurt ĉe Odro. La distrikta sekretario de la Kulturligo de GDR, s-ro d-ro Heinz Rupp, kaj la estrino de la subdistrikta gvidcentro de Neuruppin, s-ino Renate Krämer, partoprenis kiel gastoj.
La 19 gejunuloj kaj infanoj tranoktis en aparta domo kaj ankaŭ pro tio iomete pli rapide kontaktiĝis kaj kolektiviĝis.
La tagordo estis tre interesa kaj vigla. Hanna Scheffs, la estrino de la Distrikta Laborrondo analizis la evoluon de la internacia kaj enlanda Esperanto-movadoj kaj la disvolviĝon de niaj rilatoj kun la esperantistoj en la partneraj distriktoj Minsk, Opole kaj Ruse.
En la centro de la renkontiĝo staris la batalo por mondpaco, la 35a jubileo de nia liberigo el la faŝismo. Interalie la partoprenintoj povis rigardi ekspozicion pri pacbatalo en Japanio kaj Ludwig Schödl prezentis lumbildojn pri la teruraj travivaĵoj kaj suferoj de la loĝantoj de Hiroŝima kaj Nagasaki post la atombomba detruo de tiuj ĉi urboj. La prezentado estis treege kortuŝa.
La tago finiĝis per vespera dancado kaj tielnomata amerika aŭkcio, kies rezulto estis 250 markoj por la internacia solidareco.
La sekvan tagon ĉiuj partoprenintoj veturis ĉe plej bela vetero per kaleŝoj en la t. n. „Rupinan Svision".
Resumo: tre bona organizo, interesaj, seriozaj kaj distraj programeroj, kulmino de la aranĝo en la distrikto Potsdam 1980. Ingrid Schödl

Distriktaj elektoj

La deciditaj elektoj de la Distriktaj Laborrondoj Esperanto en Kulturligo de GDR jam bone progresas en la unuopaj distriktoj. Ĝis nun elektis novajn estrarojn la esperantistoj de la distriktoj Rostock, Schwerin, Neubrandenburg, Potsdam, Erfurt, Karl-Marx-Stadt, Gera. Elektiĝis kiel novaj prezidantoj de la DLE-oj en Rostock: **Werner Plate;** Schwerin: **Hans Diedrich;** Neubrandenburg: **Werner Pfennig;** Potsdam: **Hanna Scheffs;** Erfurt: **Hans-Jürg Kelpin;** Karl-Marx-Stadt: **Hans Heinel;** Gera: **Karl Raabe;** Suhl: d-ro **H.-Joachim Hußner;** Frankfurt/O.: **Helmut Lehmann.** Al ĉiuj nian sinceran gratulon kaj sukceson en la estonta laboro.
Dum la konferencoj oni ankaŭ elektis la delegitojn partoprenontajn la IIIan Centran Konferencon de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR, kiu okazos la 22an ĝis 24 an de majo 1981 en Karl-Marx-Stadt.

En „Wochenpost"

Kiel eĥo al la tutpaĝa artikolo pri Esperanto, kiu aperis en n-ro 50/79, postaj eldonoj de la semajna revuo publikigis kelkajn leterojn de legantoj. Ankaŭ en n-ro 53, p. 16, oni trovas tekston pri planlingvoj, nome, en la artikolo „E-Lok und Drahtesel (= „Elektrolokomotivo kaj biciklo"). Tie la aŭtoro tute korekte informas pri Valopük, kiu fiaskis, kaj Esperanto, kiu estas internacie parolata.
En n-ro 36/1980 aperis sufiĉe ampleksa raporto pri la 65a Universala Kongreso de Esperanto 1980 en Stokholm: „Debato sen lingvaj barieroj", de Detlev Blanke. En la n-roj 39 kaj 42 sekvis leteroj de legantoj pri la temo.

„Radio GDR" kaj „Radio Berlin"

Lastatempe du radio-stacioj de GDR raportis iom pli detale pri Esperanto. La 13an de julio 1980 „Radio GDR" disaŭdigis detalan informon pri Esperanto kaj ĝia movado kunlige kun la jubilea kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Plovdiv kaj la 31an de julio en la matena programo de „Radio Berlin" oni povis aŭskulti intervjuon kun D. Blanke pri la tiam antaŭstarinta 65a Universala Kongreso de Esperanto.
Kaj en la kadro de la populara intervjuoserio „Je via specialaĵo" en „Radio GDR" sabate, la 6an de septembro 1980, antaŭtagmeze, Detlev Blanke estis unu el la tri diskutpartneroj en la 2-hora programo. La demandoj de Günter Hansel donis eblecon komplekse informi pri Esperanto.

Seminario en Phöben

16 gejunuloj el Bulgario, ČSSR, GDR kaj Pollando renkontiĝis en la tempo de 19a ĝis 24a de majo 1980 en Phöben ĉe Werder/Potsdam.

Prelegoj en Teknikaj Altlernejoj

Dum julio 1980 la membro de la prezidio de CLE, Hans Heinel, prelegis antaŭ 50 gestudentoj de la Teknika Altlernejo en Karl-Marx-Stadt pri Esperanto kaj aparte informis pri la granda bulgara Esperanto-kongreso 1980 en Plovdiv.
La 3an de septembro 1980 prelegis d-ro Hans-Joachim Hußner antaŭ docentoj kaj lingvistoj de la Teknika Altlernejo en Ilmenau pri Esperanto. Lia prelego, enkadrigita en la oficialan kvalifikigan programon de la Altlernejo, traktis Esperanton kun ĝia strukturo, evoluo kaj historio. Ankaŭ estonte d-ro Hußner havos la eblecojn prezenti similajn superrigardajn prelegojn antaŭ la docentoj kaj lektoroj de la Altlernejo.

Informoj el GDR

Tonbanddienst 3

(vgl. die Informationen in „der esperantist“ 6/1979, S. 15, und 4/1980, S. 91.)
Bestellung bei Klaus-Dieter Dungert, 3027 Magdeburg, Albin-Brandes-Straße 3.

Programm Nr. 14: D-ro D. Blanke: „Sociaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia parolantaro“. Prelego en la kadro de la IIIa Esperantologia Konferenco, kadre de la 65a Universala Kongreso de Esperanto 1980 en Stokholmo. 30 minuta prelego kun same longa diskuto. Gute Tonqualität.

Programm Nr. 15: M. Ĝivoje (Jugoslavio): „Sociologiaj analizoj pri la strukturo de la nuntempa Esperanto-movado“. Prelego en la kadro de la IIIa Esperantologia Konferenco 1980 en Stokholmo kaj diskuto. Sehr gute Tonqualität.

Programm Nr. 16: D-ro J. Jermař (ĈSSR): „Nacia lingvo – nacia kulturo, internacia lingvo – internacia kulturo“. Prelego en la kadro de la IIIa Esperantologia Konferenco 1980 en Stokholmo kaj diskuto. Sehr gute Tonqualität.

Program Nr. 17: 65a Universala Kongreso de Esperanto. Partoj el la inaŭguro kaj la fermo. Inkluzive la esperantlingvan salutparoladon de la kultura ataŝeo de la ambasado de GDR en Svedio.

Ni funebras

- pro la forpaso de la konata iama laborista esperantisto, la prokuroro Walter Kampfrad (30. 1. 1901 — 25. 8. 1980) el Leipzig. Li gvidis de 1930 — 1933 la faman Sovetan-germanan Eldonkooperativon por Revolucia Esperanto-Literaturo (EKRELO), kiu produktis pli ol 70 titolojn
- pro la forpaso de 92jara esperantisto Arthur Schwarzbach, la 4an de aŭgusto 1980, en Zittau
- pro la forpaso de la fidela laborista esperantisto Otto Lauckner el Großenhain, kiu mortis dum aŭgusto 1980

Ni kore gratulas

- al John Skogeklint el Svedio, malnova amiko de GDR, kiu festis sian 70an naskiĝtagon la 25an de majo 1980
- al Werner Plate, kiu fine de septembro distingiĝis per la Johannes-R-Becher-Medalo en arĝento

Korekto

En „der esperantist“ n-ro 101 (3/80) ni erare informis, ke s-ro Paul Glöckner el Pirna-Copitz mortis la 25. 12. 1979. Devas esti 1978. Ni petas pardonon.

Artikoloj de Peter Levsen en „Der Morgen“ 1979

Ankaŭ 1979 aperadis la Esperanto-angulo de Peter Levsen en „Der Morgen“. Aperis 25 artikoloj kun jena enhavo:

434: Pri la vetero, 12. 1. 79
435: Deveno kaj evoluo de la Esperanta vorttrezoro, 26. 1. 79
436: Praesperanto
437: Intervjuo kun la prezidanto de MEM, 23. 2. 79
438: Einstein kaj Esperanto, 8. 3. 79 (en GDR-eldono), 16. 3. 79 (en la eldono de Berlin)
439: Antaŭ 100 jaroj aperis Volapük, 23. 3. 79
440: Fondo de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, 6. 4. 79
441: 12a Konsultiĝo en Višegrad, 20. 4. 79
442: Terminoj el la socialisma sfero, 5. 5. 79
443: Terminoj pri balotoj, 18. 5. 79
444: Denaskaj esperantistoj, 1. 6. 79
445: Materialo de CLE por memstudantoj, 15. 6. 79
446: Gratuloj por Nikola Aleksiev (foto), 29. 6. 79
447: Programo pri la Hungara Konsilia Respubliko en Berlin kaj Leipzig, 13. 7. 79
448: Antaŭ UK en Lucerno, 27. 7. 79
449: La 64a Universala Esperanto-Kongreso, 10. 8. 79
450: Hungaraj Esperantaj libroj / fondo de Kuba Esperanto-Asocio, 24. 8. 79
451: Laboristaj esperantistoj en kontraŭfaŝisma batalo, 7. 9. 79
452: Esperantistoj en faŝismaj koncentrejoj, 21. 9. 79
453: Gratuloj okaze de la 30a jubileo de GDR, 2. 10. 79
454: Pri medicinista fakgrupo de CLE, 19. 10. 79
455: Hiroŝima-Nagasaki. Animskua dokumenta libro, 2. 11. 79
456: Polisemio de Esperantaj vortoj, 23. 11. 79
457: Internacia seminario „Socipolitikaj aspektoj de Esperanto“, 7. 12. 79
458: De Struvelpetro ĝis elefantaj participoj, 21. 12. 79

Sekvu la serion! Ĝi aperadas ĉiun duan vendredon. Skribu al la redakcio („Der Morgen“, 1080 Berlin, Johannes-Dieckmann-Straße 47).

KORESPONDDEZIROJ 31635

Argentino

Letervespero, realigota decembro 1980. Sendu esperantaĵojn, leterojn, pk, esperantajn librojn, prospektojn, broŝurojn, revuojn, k t. p. 10 libropremioj por la plej bonaj sendaĵoj. Esperanto-Lernejo, Casilla de Correo 278, **2000 Rosario**

GDR

Grupo de komencantoj el Leipzig (17 ĝis 45j.) dez. kor. tutmonde. Bv. skribi al S. Liesecke, **7303 Ostrau,** Karl-Marx-Str. 26

Komencanto, 34j., dez. kor. pri lingvoj, filatelo, sporto, muziko: Hans-Joachim Schulz, **8902 Görlitz,** Straße der Bauschaffenden 47

Komencanta esperantisto, laboranta en Guben, dez. kor. kun esperantisto en proksima ĉirkaŭaĵo: Januŝ Stajŝĉak, **756 Guben,** Julius Fučikstr. 9/6

Bulgario

Ivan Zojn, 47j., TV-reĝisoro, **Sofia C,** P.O.Box 60, dez. kor. kun esperantisto-filatelisto

Dentkuracisto dez. kor., kol. bk, pm: D-ro Ivan Čunčev, **4400 Pazarĝik,** ul. V. Levski 64-8

ČSSR

18j. studentino dez. kor. tutmonde: Jane Volrábová, Chráŝtany 127, **270 01 Kneževes**

Hungario

19j. fotografistino dez. kor. k. esp. el GDR p. ĉ. t., kol. bk: Maria Kövendi Nyiregyháza, str. Kölcsey 3.1/6, **4400 Magyarország**

Du 19j. junuloj dez. kor tutmonde:

— Tibor Fekete, **9500 Celldömölk,** uzsok u. 3

— Marton Pataki, **9500 Celldömölk,** Sági u. 1/B

24j. esperantistino dez. kor. tutmonde: Ilona Fedor, **3535 Miskolc,** Szépvölgy u. 19

Pollando

Pola Studenta Esperantista Klubo, SZSP Zarzad Ubjewódzki, ul. 3 Maja 7, **40-096 Katowice,** (19—25j.), dez. kor. pri literaturo, moderna muziko, turismo, kol. turismajn prospektojn, bk

22j. fervojisto dez. kor. p. ĉ. t.: Roman Karpisz, **70-879 Szczecin-19,** Turystycna 4/2

19j. junulino dez. kor. k. esp. el GDR pri muziko, literaturo, poezio, sporto, politiko: Aldona Kulinska Debina, **62-425 Witkowo,** woj. Klonin

Komencanta esperantisto, 23j., dez. kor. pri historio, lingvoj, literaturo, kol. bk: Mieczyslaw Lapa, str. Cmentarna 57/3, **63-330 Dobrzyca**

24j. teknikisto dez. kor. tutmonde: Tadeusz Stycula, ul. Moniuszki 27/2, **21-500 Biala,** Podlaska

Rumanio

Vajda Ioan, cásuta postala 91, **2200 Brasov-1** serĉas seriozajn korespondamikojn tutmonde por interŝanĝi pm, bk, E-glumarkojn

Soveta Unio

Esperanto-Klubo serĉas kontaktojn k. samideanoj tutmonde. Bv. skribi al **281 900 Kamenec-Podolskij,** ul. Čkalova 3

E-Klubo „Flugo“ dez. kor. k. E-kluboj tutmonde. Bv. skribi al: Luba Jova, **256 300 Borispolo,** I. U. Kijevskaja obl., Kooperativnij 4

Filologo, 30j., dez. kor. tutmonde pri literaturo (sf k. aventura), belartoj, historio, kol. bk: Stanislao Bistricki, ul. Kirova 14/2 kv. 15, **690 068 Vladivostok**

16—20j. junuloj en la E-rondeto „La pordego de la maro“ dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. Komuna adreso: Gunars Jankovskis, **229 910 Ventspils,** Stacijas str. 8—1, Latvio

Esperanto-veterano, Petro Samoĥin, **352 433 Majskij Krasnodarskij kraj,** Koŝeĥablskij rajon, Juĵno-Noberejnaja 7, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 1102